

# ESPERANTO PROVENCE

Numero 83 - (Mars 2010/2011)

4 NUMEROS PERIODI

redaktoro: Renée Triolle  
[triolle.renee@wanadoo.fr](mailto:triolle.renee@wanadoo.fr)  
Bello Bauco / 694 chemin de la Civade Verte  
13600 LA CIOTAT

kasisto: Michel Cerisay  
15 Place des Vents Provençaux  
13140 MIRAMAS

## VORTO DE LA PREZIDANTO

La 2010a jaro markis daŭran agadon en la Federacio (sukcesaj lingvostaĝoj en Agay dum Mediteranea Esperanto-Semajno, en novembro en La Ciotat, en Manosque okaze de nia regiona kongreso) kaj partan renovigon de la Komitato, kiun eniris novaj

homoj. Estu 2011 feliĉa en via ĉiutaga vivo, sukcesa en via esperanto-agado, riĉa je kontaktoj kaj renkontiĝoj. Vizitu multnombre la Interasocian aranĝon IREM en nia najbara Sète.

*Pierre Oliva*

**N'oubliez pas de payer votre cotisation : 5 €,  
à payer par l'intermédiaire de  
votre groupe local ou au trésorier**

**Michel CERISAY  
15 place des Vents Provençaux  
13140 MIRAMAS**

## NEPRE NOTU LA JENAJN ARANĜOJN

**REGIONA KONGRESO;** notu la daton, la 21an kaj 22an de majo en Saint-Raphaël. Detala programo aperos en la venonta bulteno; pli da (praktikaj) informoj ĉe Monique Prezioso, [prezmoni@hotmail.com](mailto:prezmoni@hotmail.com) aŭ 04 94 83 06 88.

Vin proponu por prezenti programeron al Renée Triolle [triolle.renee@wanadoo.fr](mailto:triolle.renee@wanadoo.fr) aŭ 04 42 71 42 74.

**MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO** okazos en Agay de la 26a de februaro ĝis la 5a de marto. Vi estas viktimo de ĝia sukceso se vi planis aliĝi, ĉar ĝi estas jam plenplena. Sed eblos veni unu tagon por taĝmanĝi kun la partoprenantoj kaj diskuti kun eksterlandanoj. Sin anonci ĉe Monique Prezioso ĉar antaŭmendo nepras.

**IREM**, la Interasocia renkontiĝo kun landa kongreso de Esperanto-France kaj aliaj asocioj, i.a. SAT-Amikaro okazas en Sète de la 22a ĝis la 26a de aprilo (ĉe Pasko). Loĝado, manĝoj, spektakloj, laborkunvenoj okazas samloke en la feriejo Le Lazaret. Ebleco trapasi ekzamenon (nivelon C1) de la Eŭropa referencokadro.

Pli da informoj ĉe 04 67 39 16 30 aŭ [info@esperantosete2011.fr](mailto:info@esperantosete2011.fr) aŭ skribe al Loka Organiza Komitato, IREM 2011, 13 bis rue Haute, 30310 VERGEZE.

Riĉa kultura kaj kleriga programo atendas vin en la naskiĝurbo de Georges Brassens: ekskursoj, bazaroj, pluraj koncertoj (Jacques Yvart, JoMo kaj Solniška, Kapriol), kaj tiel plu, teatraĵo kun Teatro-Trupo de Tuluzo, Martin Weise, premiero de filmo de Dominique Gauthier.

**EKZAMENOJ:** la jara ekzamensesio okazos dimanĉon la 5an de junio en Marseille (8<sup>ème</sup>), collège Pasteur. Ebleco trapasi la trinivelajn ekzamenojn de Franca Esperanto-Instituto. Pliaj teknikaj informoj aperos en la venonta bulteno. Informiĝu ĉe Renée Triolle, [triolle.renee@wanadoo.fr](mailto:triolle.renee@wanadoo.fr) aŭ 04 42 71 42 74

**Journée Internationale  
de la Femme :  
8 mars 2011**

Envoyez un message de paix à l'association d'espéranto d'Hiroshima avant le 20 février. Vos messages (format A4 maximum) seront exposés. Indiquez nom, prénom, sexe, âge, profession, ville et pays.

Par courriel : [osioka@mua.biglobe.ne.jp](mailto:osioka@mua.biglobe.ne.jp)

Par courrier : OSIOKA Taeko, OOgonzantyo 7-15, Minami-ku Hiroshima 734-0041 Japon.

*Merci de faire circuler ce message.*

Reklamado en «Le Monde»: la japana meceno **MIYOSHI Etsuo** plian fojon pagis grandan reklamon (2paĝan) en la franca gazeto «Le Monde», la plej konata kaj elstara franca gazeto en Japanio. Sed ĉijare li aranĝis vojaĝon al Francio kaj viziton de grandaj urboj por proponi al la Francoj plian reagon. Bedaŭrinde pro malsano li ne povis viziti Avignon kaj Marseille la 23an kaj 24an de novembro. Venis lia nuna

sekretario Atilio, (el Argentino) kiu legis la planitan prelegon kaj ĉefe respondis en Marseille al demandoj pri laborkondiĉoj en Japanio. Amika manĝo sekvis.

La pagita anonco aperis en la numero de la 15a de decembro, liverita ekster Parizo la 16an .... sed pro striko de la distribuantoj multaj homoj povis aĉeti la gazeton kaj legi pri la solvo de la lingvoproblemo per esperanto.

## AKTIVAS NIAJ KLUBOJ:

**CADARACHE (04)**: ekspozicio de la 22a ĝis la 26a de novembro kun prezento de la lingvo.

**GAP (05)**: prezento de Esperanto surbaze de la enketo de Esperanto-France.

**GAP (05)**: Membrokunveno la 20an de oktobro elektis novan estraron; Prez. Julien Nicolas; Sekr. Dominique Guersing; Kasisto Jean-Louis Gobeau. Regulaj kursoj okazas; Hungarino vizitis kaj prezentis Yumeiho masaĝojn al ekstera publiko; la grupo partoprenis Feston de la Pac-Movado en Charance kaj Bio-Foiron en Embrun.



AG en Gap

La gazeto raportis.

**MARSEILLE (13)**: ne atendite Ĉino ZHENG el Pekino vizitis la kurson marde vespere. Se li ĉefe interesigis pri la privata vivo de la ĉeestantaj kursanoj, eblis fari al li tiklajn demandojn el kiuj ni ekscilis, ke se ĉinaj studentoj amase studas en Francio, estas simple ĉar universitataj studoj en Francio estas senpagaj kompare kun Ĉinio, same pri sanigo kaj medicino!

**LA CIOTAT (13)**: La Intensivan staĝon la 2an kaj 3an de oktobro vizitis homoj el Hyères (83) kaj Gap (05). Tiu 10-hora kurso permesas kompreni kiel funkcias la lingvo, lerni malgrandan vortprovizon sed uzi ĝin diversmaniere, sinprezenti kaj enkondukiĝi en esperantovivon kaj komunumon.

Se vi interesigas proponi ĝin en via urbo aŭ vilaĝo, tre simplas: sufiĉas ĉambro kun tablo kaj seĝoj kaj trovo de interesitoj (6-8 estas bona grupo). Sin turni al Renée Triolle.

**MANOSQUE (04)**: La Membro-kunveno okazos la 19an de januaro je la 17a. Pliaj informoj ĉe 04 72 39 80.

## FESTOJ ZAMENHOF

Louis-Lazare Zamenhof est né le 15 décembre 1859 et dans le monde entier les espérantistes lui rendent hommage ce jour là. Depuis 1948, on y ajoute la Déclaration des Droits de l'Homme puisque l'espéranto est la voie royale pour défendre le droit à la langue, à la non-discrimination, le droit à l'éducation, le droit de profiter des acquis de la science ou de la culture. Comment le faire quand on parle une langue de faible diffusion ou qu'on reste à l'écart des quelques langues qui se taillent la part du lion à la radio ou dans le cinéma? Aux Nations-Unies à New-York, Universala Esperan-

to-Asocio a proposé une conférence à laquelle a participé entre autres célébrités le milliardaire Soros. Dans notre région, trois villes ont rendu hommage à Zamenhof à travers l'espéranto, médium idéal pour les échanges culturels, les voyages ou l'ouverture sur le monde:

**EN GAP (05) la 15an de decembro** kunigis kelkaj homoj por festi la naskiĝtagon de Zamenhof. Venis nova ĵurnalistino, kiu multe interesigis pri Esperanto, kaj Julien la nova Prezidanto, entuziasme respondis al ŝiaj demandoj. Venis du vizitantoj, kiuj apartenas al la reta asocio «On va sortir» OVS kaj ni certe kaptos la

eblecojn organizi renkontiĝojn por disvastigi Esperanton. Provu rigardi, ĉu simila asocio ekzistas en via regiono. Ni devis ŝanĝi la antaŭviditan programon sed pli gravas informi la homojn pri Esperanto. Julien prezentis sian libron «Eble lunlumas», videblan ĉe [juliennicolas.com](http://juliennicolas.com). Ni semas kaj semas ..... (raportas Monique Arnaud)

**EN SAINT-RAPHAËL (83), la 19an de decembro.** Post la tradicia foto ĉe strato Zamenhof, bone lokita ĉe la marborda ĉefstrato, ĉiuj veturis al Agay, kie atendis nin bona manĝo en la amika etoso de «Le Renouveau». Fine de la manĝo, Carmen distribuis la kalendarojn de JEFO, vekis la intereson de ne-esperantistoj, kiuj aldoniĝis al nia grupo por kanti kristnaskajn kantojn. Posttagmeze, post loterio, kie kontraŭ 2eŭra bileto ĉiuj gajnas lotaĵon, Renée Triolle rakontis pri la 6a Azia Kongreso en Ulan-Batoro, kiun partoprenis ankaŭ Pierre Oliva kaj Nicole Lafitte, kaj prezentis fotojn kun allogaj komentoj pri Mongolio, lando trioble pli granda ol Francio kun nur 3 milionoj da loĝantoj. Mala-

peras iom post iom la tradiciaj nomadoj, kiuj koncentriĝas en la ĉefurbo. Blokita inter Rusio kaj Ĉinio, Mongolio provas trovi sian sendependan vojon. Gazeto «la Provence» raportis kun granda kolora foto. (raportas RT).

**EN AVIGNON (84), la 12an de decembro.** Bone organizita tago en la Courtine kunvenigis tridekon da homoj, malpli ol kutime verŝajne pro la malvarmeo kaj ventego. Matene Daniel Moirand verve rakontis pri «La mil kaj unu nokto(j)», pri la kompilintoj, iliaj buntaj vivoj, la «orienta» modo en Okcidento dum la XVIIIa jarcento; li legis iujn rakontojn el la miloj da paĝoj, kiujn li tradukis al Esperanto surbaze de unu el la selektitaj praversioj. Montrante belajn, ilustritajn librojn, li donis al la ni la emon legi aŭ relegi tiun majstran verkon de la tutmonda literaturo. Amika kaj abunda manĝo lasis lokon al la krokodiloj. Sed posttagmeze, Rose-Marie Quintin plian fojon brilis per sia talento enscenigi teatraĵetojn, kiujn ludis por nia plezuro esperantistoj el Avignon kaj ĉirkaŭo, kaj kantigi la sidantojn. (raportas RT).

## KULTURA SEMAJNFINO EN LA CIOTAT (13)

Jam tradicie la Domo de Ĝemeliĝo en La Ciotat gastigas kulturen renkontiĝon la lastan semajnfino de novembro, ĉijare do la 27an kaj 28an. En simplaj kondiĉoj, (kvankam la manĝo estis pli mizeraj ol kutime) gaje kaj laboreme partoprenis trideko da homoj. Trinivelaj kursoj estis proponitaj.



**Unuanivela kun Rose-Marie QUINTIN;** (raportas Claudine Donatille el Hyères. Ŝi komencis lerni Esperanton la 2an de oktobro en la intensiva staĝo ... )

Je la unuafojo mi partoprenis en la Esperanto-staĝon, kiu okazis en La Ciotat dum la semajfino 27an kaj 28an de novembro 2010. Mi

kontentis konatiĝi kun aliaj esperantistoj. Ĉar mi estas komencantino, mi partoprenis la kurson de Rose-Marie: ni serioze laboris sed ankaŭ multe amuziĝis. Vespere ni rigardis la belan filmon de Pierre kaj Nicole pri Mongolio. La bona humoro kaj la homa varmeo forgesigis al ni la malvarman kaj grizan veteron.

**Duanivela kun Nina Korĵenevskaja.** En La Ciotat okazis ĉiujara - jam tradicia - semajnfina Esperanta staĝo, organizita de Renée Triolle. Tiuj staĝoj ĉiam estas bone organizitaj kaj kunvenigas sufiĉe multajn partoprenantojn.

La ĉefa malfacilaĵo de similaj staĝoj: oni ne povas scii deantaŭe la nivelon de kursanoj. Ĉiu instruanto devas prepari diversnivelajn materialojn kaj fari sian elekton jam en la klasĉambro.

Mi gvidis grupon de la dua nivelo. Ni faris paroligan kurson kun la ĉefa temo - Rusio - ligit kun la Jaro de Rusio en Francio. En mia grupo estis kelkaj homoj libere parolantaj, kaj kelkaj aliaj, kiuj nur komencas paroli. Sed ĉiuj tre bone laboris, estis paciencaj kaj helpemaj unu rilate la aliajn. Do, por mi estis vera plezuro labori en tiu grupo.

nejo, kie nia instruistino pri la angla lernigis ĝin. Poste mi lernis per [lernu.net](http://lernu.net). Laŭ mi tiu lingvo malfermas multe da artaj eblecoj sen paroli pri la avantaĝoj.

**EP:** Kio alkondukis vin verki «Eble lunlumas»?

**JN:** Mi volis ekspluati la artan potencialon de Esperanto. Ĝiaj sonoraj, supersignoj kaj malkomunizo por la ne-esperantistoj povas ŝajni enigma kaj eĉ mistika. Tiu aspekto konformiĝas kun la fantasta universo de la historio.

**EP:** Tiu ne estas komuna speco de libro. Kial vi elektis tiun formon kun kuntekstetoj kaj fotoj?

**JN:** Kinoarto kaj fotografo ĉiam altiris min. Mi konsideras tiun libroformon pli senmova ol filmo sed ĉiam kun vida dimensio kaj pli kompleta aŭ daŭra ol fotoj. Fakte ĝi estas kiel sintezo de filmo kaj romano, estas ambaŭe bildoj kaj verkita rakonto. Ŝajnas, ke oni elektis pecetojn de filmobobeno, nur la decidajn momentojn por la historio, kaj aldonis specon de priskribo.

**EP:** Kiel vi elektis enmeti anglan kaj francajn tradukojn?

**JN:** «Eble lunlumas» celas ne nur esperantistojn, sed ankaŭ homojn, kiuj ne konas tiun lingvon. La teksto ne estas malfacila, tiel ĉiuj povas kompreni la historion. Komencantoj povas helpi sin kun la tradukoj, dum komencintoj povas eĉ diveni la vortosignifon dank'al la kuntekstetoj kaj fotoj. Plie mi nepre aldonos aliajn lingvojn sur mia retejo.


**EP:** Kie troveblas via libro?

**JN:** Oni povas ĝin aĉeti ĉe mia retejo [juliennicolas.com](http://juliennicolas.com), en kelkaj librovendejoj (ekz. en Gap ĉe Davagnier), ĉe [amazon.fr](http://amazon.fr) kaj en la libroservo de UEA.

**EP:** Ĉu vi planas verki alia(j)n libro(j)n ?

**JN:** Jes, mi pensas verki pri fontano, kiu sonĝas. Mi eble pli koncentriĝos ĉe la fotoj kaj ludoj pri fluado, uzante akvon kaj fajron. Pri "Eble lunlumas", estas ekzpozicio de fotoj, kie mi prezentas, kiel mi verkis la libron. Se vi ŝatas prezenti ĝin, demandu min.

**EP:** Ni dankas kaj bondeziras sukceson.



## ÉDITION

### Julien Nicolas publie un livre en espéranto



Julien Nicolas présente son livre "Eble lunlumas" écrit en espéranto

René Descartes en avait eu l'idée. Ludvik Lejzer Zamenhof l'a fait. En 1887, il décide de créer une langue auxiliaire n'ayant pas pour vocation de remplacer les autres idiomes, mais d'assurer la communication universelle entre personnes de langues différentes, et ce, à travers le monde entier. L'espéranto est une langue phonétique construite d'après une quinzaine de règles fondamentales, et dont les bases sont principalement d'origine indo-européenne. Se servant du petit millier de racines qui la composent, le locuteur utilise, pour s'exprimer, quelque 2250 mots issus de 28 phonèmes. On estime qu'actuellement, trois à cinq millions de personnes parlent l'espéranto à travers le monde, et qu'il existe plusieurs milliers d'espérantophones en

France. Chaque année depuis 1905, un congrès mondial d'espéranto se tient dans un pays différent, regroupant plusieurs milliers de personnes. C'est dans cette optique de dynamique constante que Julien Nicolas, 21 ans, « il se passe toujours quelque chose en espéranto dans le monde », vient de publier "Eble Lunlumas".

Cet ouvrage, fruit d'un an de travail, est un livre-film, débordant de mystère, dont l'intrigue se déroule en 1956, le long de la voie de chemin de fer du Champsaur (Gap-La Mure), qui fut construite à partir de 1910 mais jamais exploitée. Ce conte moderne se présente sous la forme d'un film minimaliste dont il ne subsisterait que quelques photographies. Ces splendides clichés argentiques en noir et blanc, dont Julien Nicolas est également l'auteur, sont d'ailleurs indispensables au déroulement de l'histoire. Celle-ci, écrite en espéranto, confère au texte une dimension énigmatique, puisqu'elle n'est pas immédiatement compréhensible par les non-espérantophones, bien que le sens profond en soit malgré tout accessible, ne serait-ce que par le biais de l'imaginaire du lecteur.

#### POUR EN SAVOIR PLUS

[esperanto.gap@gmail.com](mailto:esperanto.gap@gmail.com)  
ou 06 76 69 33 32.

L'ouvrage "Eble lunlumas" (qui comporte une traduction anglais/français intégrée) est disponible à la librairie Davagnier, par Internet sur [amazon.fr](http://amazon.fr) et sur le site de Julien Nicolas ([juliennicolas.com](http://juliennicolas.com)).



## DIVERSAJ INFORMOJ

\* Pour, comme Julien, vous perfectionner en espéranto : [lernu.net](http://lernu.net)

\* Pour informer (dans la rue, au travail, à l'école), les calendriers 2011 de JEFO sont à votre disposition.

\* Pour le dictionnaire espéranto sur iPhone : Dans « Recherche » de **Apple Store**, on tape « dictionnaire espéranto » et on trouve « YourWords » (!!!) qui est en fait un dictionnaire français-espéranto et espéranto-français... pour dépanner. Il est présenté comme dictionnaire de voyage et d'apprentissage avec plus de 21 000 définitions (ce n'est pas le P.I.V ! ! !). Il coûte 2,99 €.

\* Dictionnaires sur Internet (entre autres) :

### a) dictionnaire en ligne

<http://reta-vortaro.de/revo/> donne accès à un dictionnaire très complet avec définition(s) et exemples, mots de la même famille et traduction en une dizaine de langues choisies dans : anglais, biélorusse, tchèque, français, allemand, espagnol, hongrois, catalan, grec ancien, néer-

landais, polonais, portugais, russe, en slovaque, suédois et turc, volapük (les langues principales ont toujours leur traduction ; pour les autres, apparemment c'est aléatoire).

Et ensuite il donne ses sources.

Cette adresse (<http://reta-vortaro.de/revo/>) se trouve sur le site :

<http://www.kniivila.net/2010/revo-en-mia-posho/>

### b) dictionnaire à télécharger

Plus simple, mais qui dépanne bien, vous trouvez aussi, sur Internet le « Dictionnaire Freelang » - <http://www.freelang.com/dictionnaire/esperanto.php>

Avantage : peut être utilisé même si l'ordinateur n'est pas connecté.

-0-0-0-0-0-

**Et n'oubliez pas que le meilleur moyen d'être informé de tout ce qui se passe en espérantie, c'est d'être membre d'une association !**

## NEKROLOGO

Nekrologo: Jane DELORME estis enterigita la 21an de decembro en Brindas (Rhône). Ŝi estis tre aktiva en Carpentras (84) en la 70aj jaroj. La informon transdonis Michèle Portigliatti en CIRA. Al ŝia familio, gefiloj, nepoj kaj pranepoj, ni sincere kondolencas.